

Rakontoj pri mia vivo Gaby Tréanton

Gaby Tréanton (1920-2019) estis elstara homo de norda Bretonio (okcidenta regiono de Francio). Post infanaĝo en Morlaix, ŝi iĝis instruistino por bazlernejoj, en departementoj Finistero kaj Côtes d'Armor, interalie sur la insulo Bréhat. Ŝi finis sian profesperiodon en Saint-Quay-Perros, kaj tie emeritiĝis.

Tiu malforta virineto impresis ĉiujn, kiuj renkontis ŝian vojon. Ridetema, diskreta, humila, sed nelacigebla kaj nekredeble decidema, ŝi investis sin en pluraj asocioj, homhelpaj, filozofaj, pacistaj, kaj ĉefe agadis por Esperanto, kiu estis la vertebra komumno de ĉiuj ŝiaj engaĝiĝoj.

Dank'al la internacia lingvo, Gaby multe vojaĝadis, kaj havis multajn korespondantojn kaj amikojn en la tuta mondo.

Unu el ŝiaj esperanto-lernantoj, Maja, havis la ideon, laŭlonge de la jaroj, rakontigi al ŝi ŝiajn memorojn. Tiu kolekto de memoraĵoj, dulingva, estas historio de plena vivo dediĉita al homaro, plena je anekdotoj mirindaj kaj spiritaj.

Ni konsilas la legadon al ĉiu kiu konis Gaby-n, sed ne nur, ĉar tra tiu libro, oni multe malkovras pri diversaj aferoj : vivmaniero en bretonio antaŭ la dua mondmilito, la vivo dum milito, la vivo de juna instruistino en kamparaj vilaĝoj, informoj pri asocioj kaj movadoj ne ĉiuj tute konataj. Vi legos anekdotojn kelkfoje mirindajn kaj emociigajn. Ekzemple Gaby rakontas :

kiam infaneto, la horloĝisto de la kvartalo sonorigis ĉiujn horloĝojn de la butiko samtempe por plezurigi ŝin.

kiam infano ŝi estis terurita pro infero, dezirante morti tuj post sia komunio por ne havi tempon peki kaj do eniri paradizon.

Kiam dufoje ŝi savis infanon el dronado.

Kiam ŝi decidis bicikli el Saint-Brieuc al Parizo por vidi Parizon liberan tuj post la fino de la milito.

Kiam ŝi preskaŭ mortis pro paŝo sur elektraj trajnreloj.

Ŝi rakontas pri sia amaso da korespondantoj el la tuta mondo, pri sia partopreno al multaj kongresoj aŭ aranĝoj ; ne nur esperantaj.

Multaj fotoj ilustras la libron, de la infaneco ĝis la lastaj naskiĝfestoj.